

## Jan Kos: Polaj Kristnaskaj Kantoj

La kristana mondo kun grandega ĝojo festas ĉiujare la misteron de Kristnasko. Ĉiuj nacioj havas siajn proprajn kantojn pri la naskiĝo de Jesuo Kristo, la Savanto de la mondo. Ili nomiĝas kristnaskaj kantoj, pastoraloj aŭ kolendoj. Ĉi-lasta nomo estas uzata plej ofte en Pollando kaj devenas de la latina esprimo „calendae”, kiu signifas la unuan tagon de la monato.

En Pollando, per „calendae” oni komprenas Novan Jaron, poste novjarajn bondezirojn, donacojn kaj porokazajn kantojn. Fine oni ekuzis tiun ĉi nomon en pli vasta senco, aplikis ĝin al ĉiuj kristnaska kantoj .



Pastoraloj, en nia kompreno, estas kantoj laŭenhave malpli seriozaj, kiujn oni kantas ne dum oficiala liturgio, sed aliokaze, private. Laŭ la pola tradicio, kolendoj estas kantataj de la tago de Kristnasko ĝis la Festo de Prezento de Jesuo en la jeruzalema templo, t.e. dum periodo de la 25a de decembro ĝis la 2a de februaro.

Polaj kolendoj estas – laŭ la opinioj de poloj kaj multaj eksterlandanoj - belegaj kaj bunte diversaj: gajaj, viglaj, fantaziaj, kortuŝaj, tre familiarecaj, sed ĉiam plenaj je respekto kaj varma amo al Jesuo kaj Lia Patrino. La kantoj kreas unikan etoson de festa ĝojo, rakontante diversmaniere pri la detaloj de Dinaskiĝo, emocie esprimas ĝojon kaj dankon pro la alveno de Jesuo kaj ankaŭ sinceran kunsenton pro la severaj kondiĉoj, en kiuj tio okazis...

Oni povas diri, ke en niaj kolendoj speguliĝas la psiko de la pola nacio: senpera, emocia, foje melankolia, ĉiam plena de espero, ke Dia Infano alportos al ni ne nur eternan vivon, sed ankaŭ pli prosperan surteran estonton. La kolendoj prikantas la naskiĝon de Jesuo Kristo en Betlehemo, sed tiu Betlehemo estas lokita en polan pejzaĝon, en polajn kondiĉojn – sociaj kaj eĉ politikaj.

Foje kolendojn komponis veraj verkistoj kaj poetoj, sed plej ofte faris tion talentaj, anonimaj amatoraj aŭtoroj. Pro tio ofte troviĝas en ili rimaj kaj akcentaj neregulaĵoj, portantaj al ili specialan koloron de popola naiveco. Samtempe tio malfaciligas la aplikon de tradukaj reguloj.

Tial en la tekstoj de tradukitaj kolendoj - oni restigis senkonscie aŭ eĉ intence, iujn neregulaĵojn, ĝuste por konservi tiun ĉi „polan koron kaj koloron”...

En niaj Kristnaskaj kantoj, aŭdiĝas la ritmoj de popolaj dancoj: polonezo, mazuro, krakovjako. Polaj kolendoj estas impone multnombraj. En la libro de Jan Kaszycki, eldonita en la jaro 1911 en Krakovo kun titolo „*Kantyczki z nutami*” (Kantikoj kun muziknotoj) troveblas 195 kolendoj kaj 70 pastoraloj. Kune - 265 Kristnaskaj kantoj !

El ili - ne tro multe estis esperantigitaj, oni povas trovi ilin en Kantareto de sac. Henriko Paruzel „*Hodiaŭ ni preĝas*” kaj en la libro de sac. Jozefo Zielonka „*Ni vivu laŭeble plej bele*”, en Evangelia Himnaro de KELI „*Adoru Kantante*”.

Multajn Kolendojn tradukis al Esperanto ankaŭ pastro d-ro Jan Kos, kiu preparis elekton de la plej famaj, kaj eldonis en Nowy Sącz (1990) libreton „*Kristnaskaj Kantoj*” kun esperantigitaj 31 kolendoj polaj kaj 15 – kolendoj alilandaj. El tiu ĉi kantareto ni elektis por prezento 3 kolendojn diverstipajn, por montri ilin en la projekta broŝuro: tiu ĉi la unua, estas la plej grava, kantata plej laŭte en la preĝejoj komence de diservo dum la „Kristnaska periodo” – DI NASKIĜAS!

La dua Kolendo – „ DUM NOKT’ SILENTA estas tre ŝatata kaj plej ofte elektata por kanti ĝin hejme, familie, ĉe kristnaska laboro. Kaj la tria ekzemplo, elektita de ni, montras nian tipan polan korsentemon. Ĝi estas la kolendo „EN BETLEHEMA GASTEJO”, tre bela, kvankam tristiga pro la fina konstato , ke mankas la amo en homaj koroj...

**Jen Esperantaj vortoj al la tri, supre priskribitaj polaj kolendoj :**

## **Bóg się rodzi – Di naskiĝas**

*Di naskiĝas, forto falas, fajro frostas,brilo palas  
 Mondsinjoro nuda tremas,senfinulon limoj tenas  
 Fil’ de l’ gloro en mizero, mortos Vivdonanto sole  
 Vort’ karniĝis sur la tero, inter ni ekloĝi volas...*


*Kio gravas pli ol tero, Di’ ĉielan lasis ĝojon –  
 ne plezuron, sed suferon- sekvas Li sur homa vojo  
 Niajn kulpojn Li transprenis, kaj suferis senkonsola  
 Vort’ karniĝis sur la tero – inter ni eklogi volas*


*En malriĉa ste’ naskita, trogon havis por lulilo,  
 Brutoj staris ĉe la lito, fojno kovris Dian Filon.  
 Malriĉuloj kun sincero, Lin salutis senparole  
 Vort’ karniĝis sur la tero – inter ni eklogi volas*





## **Bog sie rodzi**

Guitar


  
 Bóg się ro - dzi, moc tru-chle - je, Pan nie-bio-sów o-bna - zo-ny.


  
 O-gień krze - pnie blask ciem-nie - je, ma gra-ni-ce Nie-skoń - czo-ny!


  
 Wzgar - dzo-ny o - kry-ty chwa - lą, śmier - tel-ny król nad wie-ka - mi.


  
 A Sło-wo Cia - łem się sta - ło i mieszka-ło mię - dzy na - mi.



## Wśród nocnej ciszy - Dum nokt' silenta...

*Dum nokt' silenta kantas tutĉiel  
Paŝtistojn vekas vortoj de l' Anĝel  
Tuj leviĝu rapideme, iru rekte Betlehemon  
Dion vidos vi, Dion vidos vi*

*Paŝtistoj trovis laŭ anĝela kant'  
Naskiĝolokon de la Di-Infan  
Kaj adoris Lin bonkore, kiel sian Di-Sinjoron  
En la stala trog', en la stala trog'*

*Saluton Kristo, nia Di-Mesi'  
Dum kvar jarmiloj - vin atendas ni.  
Vin profetoj vidi volis, sed hodiaŭ vi konsolis  
Nin per via ven', nin per via ven'*



## Nie było miejsca dla Ciebie – En Betlehema gastejo

*En Betlehema gastejo, por Vi ekmankis la loko  
Kaj vi naskiĝis, Jesuo, en frida stal', en la trogo  
Ekmankis loko por tiu, kiu alvenis sur teron  
Adaman pekon nuligi, forigi damnon inferan...*

*Kaj kvankam teron Vi venis, ĉielan fajron bruligi,  
Per via ega sufero, de l'mond'pereon haltigi  
Kaj kvankam esti vi volis por ni de l' vivo la pano  
Kaj nin por ĉiam regali, per paco ĝojo ka jamo  
Dum vulpo kavon posedas, kaj birdo sian nesteton  
Por Vi ekmankis gastejo, Vi devis serĉi trogeton...  
Kaj kial inter la homoj, militoj estas kaj krimoj?  
Ĉar mankas al Vi la loko en multaj homaj animoj...*



La fotoj estis faritaj fare de Katalin Kováts, dum la pola Grundtvig-seminario en Nowy Sącz, januaro 2014.